

LA LAMPIRO

59-a jaro n-ro 153 2018:5

CE
s
a
b
o
r
a
t
o

MARE OCEANO

De la 20-a ĝis la 23-a de junio 2019

54-a Brazilia Kongreso de Esperanto

39-a Brazilia Esperantista
Junulara Kongreso



TEMO: ESPERANTO, KULTURO KAJ ARTO:
KUNAJ EN KONSTRUADO DE NOVA SOCIO.



GOJANJO
GOJASO - BRAZILIO

<http://esperantogoias.com.br>



Brazilia Esperanto-Ligo



LA LAMP1RO

59-a jaro

n-ro 153 2018:5

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)

Grafikaranĝo: Sajjad Dashti Nezhad

Revizianto: José Roberto Tenorio

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj

easp

Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca

05041-000 São Paulo, SP - Brazilo

Telefonnumero: (11) 3862-1183

easp.org.br | contato@easp.org.br

Jarkotizo por 2018

Simpla Membro R\$ 120,00

Subtena Membro R\$ 240,00

Ŝtatinterna Membro R\$ 60,00

Deĵoroj:

merkrede: 10h – 16h; ĵaŭde kaj vendrede:

13h – 17h; sabate: 9h – 13h.

Estraro

Prezidanto: Genildo Martins
Coelho

Vicprezidanto: Marcos
Zlotovich

1-a Sekretariino: Anna Lobo
de Carvalho

2-a Sekretariino: Sidnéa da
Conceição Beall

1-a Kasisto: José Roberto
Tenorio

2-a Kasisto: Vakas

Propaganda Direktorino:
Cristina C. de Graaf

Konsilantaro

Paulo Sérgio Viana, Audino
Castelo Branco

kaj Aparecida de Souza Araújo
Anstataŭantoj

José Mauro Progianta kaj
José Martins Coelho

6

Ĉu vi konas la 1g-nobelpremion?

7

El interreto

10

SUKCESA 12-A
ŜTATA KONGRESO
DE ESPERANTO EN
SAN-PAŬLO

11

Mia muzika dio

13

Kino: Kiel steloj
surtere

— ENHAVO —

15

Malpaco inter
homoj

16

NE ESTU
HUNDECA
NIA FIDELECO

18

Pri la etna lingvo
cigana

21

“REV-ENE” – NE
NUR VORTLUDO

23

Profiti de UK
por turismi

26

BLINDA FIDO,
TRANĈILO AKRA:
tikla brazila
momento

30

LINGVAJ
RESPONDOJ

33

TIBOR, MIA
HUNGARA
SAMIDEANO

VORTOJ DE LA REDAKTORO

Dum la 12-a Kongreso de Esperanto en Ŝtato San-Paŭlo, kiu ĵus okazis, ni povis persone interŝanĝi ideojn pri nia revuo La Lampiro kun pluraj geamikoj. Tia persona kontakto montriĝas ĉiam fekunda kaj varma. Inter iuj opinioj, ni perceptis, ke mankas inter ni pli da diskutoj pri la enhavo mem de la revuo, kaj ankaŭ pri la laboro mem en la asocio. Multaj belaj ideoj troviĝas en la kapo de multaj samideanoj. Mistere, ili tamen restas tie enfermitaj. Kial ne alporti tiujn ideojn por ĝenerala diskuto? Kial ne iniciati novajn laborojn por la kreskado de la Esperanta afero en nia regiono? Esperanto plu estas nekonata de la ĝenerala publiko. Ĉu ni povus fari ion por ŝanĝi tian situacion? Nia revuo povas esti pli varia kaj riĉenhava. Ĉu tio dependas de ni mem?

La redaktoro atendas viajn proponojn kaj konkretajn paŝojn.

VORTOJ DE LA PREZIDANTO

Pasis kun sukceso unu plia Ŝtata Kongreso de nia EASP. Estas tempo por gratuli, por celebri, por danki.

Ni gratulu la samideanaron en nia regiono, kiu alvenis, apogis, diskutis, aktive partoprenis, kunkreis amikan etoson. Montriĝis, ke la kunvivado fizika estas nemalhavebla, paralele al la virtuala, reta agado. Ni celebru, ke nia Internacia Lingvo unu plian fojon bele funkciis kiel motivo por homama idealo, por amikeco kaj solidareco. La Interna Ideo de Esperanto estas vivanta, sen ia dubo. Ni danku la fidelajn membrojn de EASP, kiuj, jaro post jaro, firme tenas la principojn de nia ŝtata asocio. Nian elkoran brakumon al ĉiuj, kune kun nia promeso, ke laborado por la proksima kongreso jam komenciĝas. Kaj ni kalkulas je la plua partopreno de vi ĉiuj!

Kaj apartan dankon al la teamo de <pola-retradio.org>, kiu simpatie informis pri nia kongreso (elsendo 798-a).

Prof. Genildo Martins Coelho

ĈU VI KONAS LA 1g-NOBELPREMION?

Aleksandro Prado

Ig-Nobelpremio estas donata al la plej strangaj sciencaj malkovroj. Tiuj malkovroj estas strangaj aŭ sentoplenaj kaj eĉ pensigaj, tamen plej ofte ridigaj. La premio estis kreita de humura scienca revuo nomata *Annals of Improbable Research* (*Analoj de Malprobabla Esplorado*) fare de Universitato de Havard. Ja, la elpenso estas, ke tiaj premioj elvoku la publikon pripensi la teknologion kaj sciencon. Ekde 1991 oni premias sciencajn malkovrojn kaj sube mi montros kelkajn el la ĉi-jaraj laŭreatoj. Tamen, kion ili gajnas? Ĉiu premiito gajnas 10 trilionojn da Zimbabvaj dolaroj, kies ekvivalento en usonaj dolaroj estas preskaŭ nenio.

La ĉi-jaraj premioj temis pri:

Antropologio: Tomas Persson kaj lia skipo, kiuj kolektis evidentaĵojn en zoologia ĝardeno, per kiuj ĉimpanzoj imitas homojn en la sama ofteco kiel homoj imitas ĉimpanzojn.

Biologio: Paul Behxer kaj lia skipo, kiuj pruvis, ke vinospertuloj povas nepre identigi la odoron, la ĉeeston de ununura muŝo en glaso da vino.

Kemio: Paula Romão kaj ŝia skipo, kiuj mezuris la gradon ĝis kiu la homa salivo povas purigi malpuran surfacon.

Literaturo: Thea Blackler kaj skipo, kiuj dokumentis, ke plej multaj homoj, kiuj uzas kompleksajn produktojn, ne legas la manlibron de instrukcioj.

Paco: Francisko Alonso kaj skipo, kiuj mezuris la oftecon, la motivigon kaj la efikojn de homoj, kiuj laŭte krias en trafikŝtopiĝoj.

Ekonomio: Lindie Hanyu Liang kaj skipo, kiuj esploris la uzon de vuduismaj pupoj kiel efikan manieron por ke oficistoj punu siajn fiajn estrojn.

EL INTERRETO

La Lampiro rekomendas hodiaŭ du retejojn, kiuj proponas valorajn kulturmaterialojn. Unu estas skriba, alia podkasta:

verkoj.com

La retejo proponas signifoplenan devizon: “Esperanto ne estas nur lingvo. Esperanto estas kulturo.” Por tio ĝi proponas senpagan aliron al kolekto da variaj literaturaĵoj. Ili estas originalaj kaj tradukitaj prozaĵoj, poemoj, anekdotoj, bildstrioj, infanlibroj kaj informoj pri Esperanto en pluraj lingvoj. Kaj ĝi proponas, ke verkistoj kontribuu per siaj propraj tekstoj.

kern.punkto.info

Temas pri kolekto da podkastoĵ de paro da geesperantistoj, kiuj interparolas pri elektitaj temoj. Kelkaj ekzemploj: “Berlina Muro”, “Mapoj mensogas”, “Nuklea Energio”. La registraĵoj daŭras mezume unu horon, dum kiuj la parolistoj bonhumore, vigle, inteligente parolas inter si. Foje, ili akceptas specialan invititon, ĝenerale fakulon pri la pritraktata temo. La informoj estas interesaj, la babilado entuziasma, la uzado de la lingvo estas tute flua, la sonado plej ofte klara. De tempo al tempo aperas novaj podkastoĵ.

Taŭga por kleriĝo kaj praktikado de la lingvo per aŭskultado.

kern.punkto  info
tekniko · kulturo · socio



SUKCESA 12-A ŜTATA KONGRESO DE ESPERANTO EN SAN-PAŬLO

De la 12-a ĝis la 14-a de oktobro 2018 okazis en la urbo Ataibaia, en ŝtato San-Paŭlo, la 12-a Ŝtata Kongreso de Esperanto. Enskribiĝis 85 homoj (inter ili du gekubanoj), kiuj dum tri tagoj kunsidis en komforta Centro de Eventoj, meze de belega, arboriĉa Parko de Akvoj.

Posttagmeze de la unua kongresa tago oni ceremonie malfermis la eventon. Parolis la reprezentanto de la loka laborgrupo kaj ĉefa organizanto, S-ro Audino Castelo Branco, kiu salutis kaj bonvenigis la kongresanojn. Sekvis la saluto de D-ro Alberto Cutiño, kuracisto el Kubo, kiu ĉeestis reprezente de Kuba Esperanto-Asocio kaj Latinameriko. Poste, la saluto de S-ro Emílio Cid, reprezentanto de Brazila Esperanto-Ligo kaj estrarano de Universala Esperanto-Asocio. Kaj fine de la ceremonio, oficiale malfermis la kongreson S-ro Marcos Slotovitch, vic-prezidanto de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, anstataŭe al la prezidanto Genildo Coelho, kiu ne povis ĉeesti. Fine de la solenaĵo, muzikensemblo “Pé de Choro” ludis la brazilan nacian himnon kaj La Esperon. La programo estis tre varia je prelegoj (40-minutaj) kaj prelegetoj (20-minutaj). Jam en la unua tago, post la malfermo, Emílio Cid prelegis pri la reta kurso

Duolingo, kiu proponas instruadon de Esperanto en tri lingvoj, kaj Audino Castelo Branco prelegis pri matematiko, la muziko de numeraloj kaj la melodio de vortoj. Aliaj prelegoj dum la kongreso estis: Universala Kongreso en Lisbono (Cristina Graaf, el Ilhabela), Dimensioj en la Universo (Guilherme Jardim, el Charqueada), Anarkiismo kaj Esperanto (José Luiz Ferreira, el São Paulo), Historio de Brazilo (José Mauro Progiante, el Bauru), Genealogio (Francisco Wechsler, el Campinas), Poezio (Paulo S. Viana, el Lorena), Veganismo (Pedro Freitas, el Ribeirão Preto), ILEI (Marcos Slotovitch, el San-Paŭlo), Aktivado por EASP (Cristina Graaf, el Ilhabela), Pseŭdoreligioj (Fábio Silva, el Pouso Alegre/MG).

Krome, okazis rapida kurso de Esperanto, paroliga kunsido por komencantoj, arta vespero kaj intervjuo kun veteranoj ("Viva Gazeto"). Dum la tuta kongreso funkciis sufiĉe ampleksa libroservo. En la kongreso oni lanĉis plurajn novajn



12^o
Congresso
Paulista de
Esperanto

Atibaia - SP
12 - 14 out 2018

Centro de Comunidade Virtual Esperanto
Rua da Liberdade, 111
Piedade, São Paulo - Atibaia, SP

Realização
easp

Apoio cultural

9

Patrocinado por
Fórum de Atibaia

La Lampiro 153-5



librojn, iniciate de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo kaj de la nova brazila eldonejo Esprima. Jen la titoloj de la libroj, mendeblaj al la butikoj de EASP: “Nigra Birdo” (originalaj rakontoj) de Paulo S. Viana; “Al ĉiu tago ĝia legaĵo” (artikoloj el la Esperanta Retradio), de Paulo S. Viana; “La malbeno de Tarumo kaj Nurana”, de Mauro Progiante. Krome, eldonejo Esprima lanĉis unu plian minilibron: “Karlo” de E. Privat.

Unu el la plej kuriozaj detaloj en la kongreso estis la komuna foto. Kongresanoj staris sur placo kaj formis grandan kvinpintan stelon, kiun de la ĉielo fotis kaj filmis flugroboto(*), sub la regado de Emílio Cid.

Entute plene sukcesa kongreso!

(P.S.V.)



<https://youtu.be/JY2Z56WgYE0>

Nun mi sentas min eniranta en la tempon nur per la volo, kiel se la filo de la homo (mia korpo) ne malpermesus al la filo de Dio (mi spirito) – se ni prenu la difinojn de Jesuo la Kristo - sendependiĝi, kaj eniri en la tempon, kiu laŭ Herminio C. Miranda estas “iu loko”. Mi min direktis al la “loko”, kie mi trovos, laŭ fida informo, Mian Muzikan Dion: J. S. BACH.

Mi havis malfacilecon, ĉar estis al mi malpermesate supreniri al tiu loko. Sed post multaj petoj miaflanke, mi estis informita, ke Bach petis permeson malsupreniri por dialogeti kun mi, dum tre limigita tempo. Tre rapide mi iris antaŭ lin per tremantaj kruroj, sed la deziro esti antaŭ li venkis ĉiujn malfacilaĵojn de la korpo. Mi havis mense multajn demandojn. Tamen, lia impona ĉeesto kaj mia korpremo mutigis min. Do, kia honto, mi simple surgenuiĝis kaj plorgutoj aperis sur miaj okuloj. Li kun rideta mieno tuŝis mian kapon kaj diris: leviĝu kaj ek al la laboro. Post la diro de tiuj vortoj mi sentis min tute renovigita, tion mi ŝuldas al lia

bonkoreco (aferoj de konkeroj). Li diris:

- Via unua demando estas...? Faru!
 - Do, jes, hm, se vi taksas miajn demandojn ne decaj aŭ malĝentilaj, ne respondu; diru nur, ke mi faru alian. Jen do, Vi restis surtere nur 65 jarojn kaj verkis pli ol 1.200 muzikaĵojn, inter ili kelkaj daŭras pli ol unu horon. Ĉu tiu kvanto estas korekta?

- Ne, tute ne, eble pliajn 300 oni ne trovis ankoraŭ.

- Ni ne forgesas, ke vi estis ankaŭ majstra interpretisto kaj ne nur per unu instrumento. Vi ludis: violonon, aldoviolonon, orgenon kaj klavicenon, krome vi estis ankaŭ konstruisto de orgenoj. Ĉu vere vi faris piedan vojaĝon de unu urbo al alia je distanco de pli ol 200 kilometroj por aŭskulti alian orgeniston?

- Jes, mi vizitis unu el miaj filoj tie kaj profitis por aŭskulti bonegan orgeniston.

- Via kreivo estis tiel interne de vi, ke eĉ filojn vi faris abunde (21). Ĉu vi havis iun preferon pri viaj verkoj, se ne paroli pri viaj filoj? Ĉu estis iu

speciala por ludi, tio estas, kiun verkon vian vi tre ŝatis ludi?

- Ama patro ne diferencigas filojn.

Jen, la limigita tempo finiĝis kaj la demandojn pensitajn mi ne sukcesis fari. La emocio tute ne permesis al mi esti kohera por fari kelkajn demandojn. Kaj kiel kronon mi nur enfazas la malsimilon inter ni, mi faris longajn kaj konfuzajn demandojn kaj li respondis saĝe.

Sed mia scivolemo estis tuŝita, same la deziro reveni.

Bildstrio



Kino: Kiel steloj surtere

Anna Lobo (São Paulo-SP)

FILMO

Direktoro: Aamir Khan kaj Amole Gupte


Originala nomo: Taare Zameen Par

Aktoroj: Darsheel Safary, Aamir Khan kaj Tisca Chopra

Lando: Barato

LANĉo: 21.12.2007

Tempo daŭro: 165 min



La hodiaŭa filmo estas ege speciala. Dum mi esploris pri la filmoj en Netflix serĉante pri tio, kion mi verku ĉi-foje, mia vizaĝo ege ekbrilis, kiam mi vidis, ke filmo, kiun mi antaŭ longe spektis jam estas trovebla tie! Mi tiom ŝatis tiun novaĵon, ke mi re-spektis ĝin tre plezure kaj ĝuis samajn emociojn kiel tiajn kiam mi spektis la unuan fojon.

“Kiel steloj surtere” estas barata filmo, kiu tuŝas temon ege karan por mi - Edukadon. Ĝi rakontas pri infano, kiu nomiĝas Ishaan. Li ne estas ordinara infano, kaj jam de komenco oni rimarkas tion. Li estas ege revema, pentrema kaj kreema; sed havas multajn malfacilaĵojn en la lernejo, kaj en ĉiutaga vivo - ĉefe kun la kruda kaj postulema patro.

Post kiam direktorino de lernejo, en kiu li studis, diris, ke oni ne povos reakcepti la infanon por plia jaro, la patro decidis meti la infanon en internul-lernejon. Estis tre malfacile por li adaptiĝi al la loko. Kaj Ishaan tiom deprimiĝis, ke li eĉ ne plu emis pentri. Bonŝance, la lernejo akceptis novan instruiston pri arto, kiu venis kun nova freŝa aero kaj vidpunkto pri edukado.

La instruisto Ram Shankar jam estis apoganto de lernejo, kiu zorgas pri handikapaj infanoj. Li mem havis problemojn kiam li estis infano, la samajn de

Ishaan. Tial, rapide li atentis pri la infano kaj sentis sin ege kortuŝita, kvazaŭ li vidas sin mem en la infano. Tiam li decidis rapide interveni por ke Ishaan estu helpata kaj elsavita de la situacio - ĉefe elstarigante liajn kapablojn kaj kreemon. Same bonŝance, la lernejo estis malferma al la agado de la nova instruisto.

Sed kiom da infanoj ne havas saman ŝancon kiel tiun de Ishaan, ĉu pro la familio aŭ pro la lernejo?

Kiom da talentoj kaj perloj estas tonditaj, nur pro tio ke ĉiuj emas normaligi ĉiujn kaj ne valorigas la diversecon en edukado? Kiom da infanoj vivas sen koloroj kaj vivemo pro tio ke ili ne sentas sin amataj tiaj, kiaj ili estas? Kiom da tempo necesos, ĝis ni lernos tion, kio pli gravas: ĉu atingi postulojn, havaĵojn, perfektecon

aŭ atingi feliĉon, amon ami la diversecon kaj la estecojn de tiuj ĉirkaŭ ni?

La filmo estas ege bone filmita kun bonaj dialogoj kaj ege kortuŝaj scenoj. Kiel barata muzikema filmo, eble ĝi iomete troigas pri kantoj kaj dancoj. Sed, mi ege indikas ke ĉiuj prenu iom da tempo por spekti tiun ĉi tre belan, koloran kaj emociigan filmon. Kaj revu ni pri iu pli bona mondo, pli bona interrilato, pli ama etoso kaj ĉefe pli da atento al edukado. Bonan spektadon, kaj ĝis poste!



MALPACO INTER HOMOJ (Pensoj de eksfajrobrigadisto)

Esmeraldo Aparecido de Alencar Lima

Kiam mi vidas malpacon inter brazilanoj, eĉ se nur per paroloj, mi pensas pri la okazoj, kiam mi helpis viktimojn de plurspecaj akcidentoj. Mi rakontos al vi, kiel mi vidis la viktimon de akcidento:

Mi alvenis al la loko kun korpremo, kaj mi klopodis helpi la vunditan viktimon; mi rigardis liajn okulojn, kaj mi vidis lian deziron plu vivi, ĉar liaj okuloj senvorte diris: “Bonvolu savi min!”. Tio, kion mi vidis, estis homo.

Kiam mi venis por savi beston (bovon, katon, hundon), mi same rigardis ĝiajn okulojn, kaj la sama peto “savu min” estis klare videbla.

Mi kaj miaj kunbrigadistoj uzis ĉiujn rimedojn por savi viktimojn, ĉu bestojn, ĉu virojn, virinojn, infanojn, junulojn, maljunulojn. En tiu momento, oni ne pensas pri raso, ĉiuj estas egalaj, la vundoj estas la samaj, la sufero estas simila, la penso estas simila, la doloro estas simila, ĉiuj volas plu vivi, neniam morti, ĉiuj eĉ sen espero batalas por la vivo. Tiam, mi kaj mia laborgrupo eklaboris por la vivo, sendepende de la haŭtkoloro, ĉar la sango verŝita estas egale ruĝa, kaj ĉies koroj laboras simile, same pri ostoj, muskoloj, vejnoj. Vundoj permesis, ke oni rigardu internen de tiu vivulo. Ni aŭdis kriojn, ĝemojn, angoron, sed ni ne rajtis kondukti laŭ niaj sentoj, sed laŭ nia racio, por plej efike plenumi eblan savon. Foje ni devis prokrasti la helpon pro la komplika situacio de la akcidento, kaj tiumomente, mia penso estis nur konsoli la suferanton. Ni faris ĉion teknike eblan, kaj ni portis la viktimon en hospitalon, kaj dum la transdono al medicinistoj ni vidis la rezulton de la konsolo kun ĝojo, malgraŭ la tuta sufero.

Ĉe bestoj okazas same. Kiam ni forprenis kompatindan beston el puto, sur ĝiaj okuloj troviĝis tiu sama feliĉo, ke ĝi revenis al libereco. Mi memoras, kiam ni elprenis el puto ĉevalidon. Ĝi vidis sian patrinon kaj tuj alkuris al ĝi, kaj per sia heno ĝi esprimis feliĉon, kiu emociis nin. Ĝiaj movoj kaj la karesoj al la patrino signifis por ni dankon. Dum momento, ĝi rigardis nin fikse kaj signifoplene. Ni prenis niajn laborilojn kaj foriris, kun sento de kontenteco.

Hodiaŭ mi pensas: Kial ni malpacas? Ĉiuj vivuloj volas plu vivi!

La brazila poeto Vinícius de Moraes, en sia “Soneto de la Fideleco”, esprimis la deziron, ke la amo, kiun li sentis al virino, ne estu senmorta, ĉar amo estas flamo; sed ke ĝi estu senfina dum sia daŭro.

Ordinare oni citas la hundojn kiel ekzemplon de fideleco, ĉar ili ne juĝas nek forlasas sian mastron. Kaj multaj opinias, ke la homoj devas esti fidelaj kiel ili.

Tamen, la afero ne estas tiel simpla. Hunda amo estas senkondiĉa kaj porĉiama, dum homa amo povas finiĝi, kiel diris la poeto.

Kvankam la vorto fideleco kutime elvokas en la mensoj rilaton (ĉefe seksan) inter viro kaj virino, la fakto estas, ke ĝia senco estas multe pli larĝa. Eblas esti fidela, aŭ malfidela, ankaŭ al amikoj, partioj, ideoj ktp. La temo estas fideleco kiam ni diras, ekzemple, ke niaj amikoj ne estas kiel niaj vestoj, kiujn ni ŝanĝas ĉiutage, aŭ, ke soldato obeas ĝismorte sian generalon.

Se en la hundoj fideleco estas instinkta, en la homo ĝi dependas de la volo, ĝi originas el kompromiso. Ni decidus esti fidelaj al io aŭ iu, konsiderante la pasintecon (la memoron pri tio, kion ni ŝatis travivi) kaj la estontecon (la deziron plenumi nian promeson). La elekton de la afero al kiu ni ĵuras fidelecon ni devas fari saĝe kaj krome ni devas konscii, ke tiu elekto alportos penadon. Stari fidele malfacilas.

Ne malofte la natura fideleco de hundo profitigas malbonan mastron, same kiel la volonta fideleco de homo estas direktata al maljusta celo. De hundo oni ne povas atendi alian sintenon, sed de homo jes, ĉar, kiel diris Vladimir Jankélévitch, ne ĉia fideleco estas laŭdinda. Tio dependas de la valoroj al kiuj ni estas fidelaj. Fideleco al bagateloj ne estas virto, estas nur malgrandanimeco. Fideleco al malbono (ekzemple tiu de SS-anoj al Hitlero) ankaŭ estas malbono.

Fideleco estas virto intime ligita al vero. Ĝi situas sur linio kies ekstremoj estas nekonstanteco kaj obstineco. Do ne estas fidela la persono ŝanĝiĝema, kiu senĉese kaj senpripense saltas de unu al alia kredo aŭ idealo, facilanime apartiĝas de siaj amikoj aŭ kolektas partnerojn en siaj amrilatoj. Kaj ne estas fidela ankaŭ tiu, kiu preterlasas la veron pretekstante jugon de antaŭa memdecido.

Ĉar fideleco distingiĝas de fido, ĝi ne povas baziĝi sur dogmoj. Se iu kredas, malgraŭ la kemiaj leĝoj, ke eblas mirakle transformi akvon en vinon, tiu havas simple fidon, sen kompromiso kun la vero. Fideleco al pensado pravigas konservadon de ideoj, se ne estas fortaj motivoj por ŝanĝo. Tamen, se nova ekzameno rivelas, ke la ideoj estis entute aŭ parte eraraj, ne plu estas rajto konservi ilin nome de fideleco.

André Comte-Sponville prezentas la rilaton inter fideleco kaj ekskluziveco. Laŭ li, esti fidela pri ideoj ne estas havi nur unu ideon kaj esti fidela pri amikeco ne signifas, ke ni devas havi nur unu amikon. Se en tiuj kampoj fideleco ne postulas ekskluzivecon, li demandas, kial la afero estas rigardata alimaniere kiam la temo estas fideleco pri amo, kial la amanto volas ĝui ekskluzive la amaton. Kvankam li mem ne respondas tiujn tiklajn demandojn, li opinias, ke tiu komuna sinteno pri la afero eble estigas pli da komforto kaj sekureco kaj faciligas la vivon de la personoj.

La fakto estas, ke ankaŭ en amrilatoj la principoj de fideleco validas. La vero estas en ĝia fundamento, sed ne necese la ekskluziveco. Pro tio, ekzistas paroj kiuj estas fidelaj preter zorgoj pri seksa perfido. Ili konservas sian rilaton surbaze de amo, libereco kaj reciproka respekto. Kaj eĉ se iam okazas fizika apartiĝo, ili restas fidelaj al la amo kune ĝuita. Aliflanke, ekzistas paroj, kies rilato baziĝas sur postulo pri seksa fideleco. Ofte okazas, ke la individuoj de tiaj lastaj paroj intime volas la apartiĝon, sed ne kuraĝas fari tiun paŝon, nome de fideleco kiu vere jam mortis, ĉar ili perfidis la veron.

La rekomendo estas, ke la nuna amanto ne promesu eternan amon al la nuna amato. Alivorte, ne ĵuru, ke vi amos por ĉiam, sed ke vi ĝestos fidela dum la amo daŭros kaj ankaŭ post ĝia fino.

PRI LA ETNA LINGVO CIGANA

V. SZABADI TIBOR J.

Mi mem kun tiuj konsentas, kiuj tiel opinias, ke la cigana(j) lingvo(j) estas ETNA(J). Dume Esperanto estas internacia, eĉ pli da uzantoj ĝi havas mondscale.

Ekzemple vidu, ke la revuon de UEA „Esperanto” oni legas ĉ. en 115 landoj... pripensu tion.

Jes, ni devas paroli, okupiĝi pri la komparo de lingvoj, pri tiuj, kiuj tute ne estas kompareblaj, kio koncernas la ciganan kaj Esperanton. Aŭ estas tiuj „malsaĝuloj”, kiuj **vole** komparas ilin...?! Al ĝi respondon ne mi devos doni.

Sed mi ŝatus voki la atenton al ĉiuj, kiuj iom interesiĝas pri la cigana lingvo. Laŭ iuj, ne ĝustaj kunkalkuloj, en Hungario vivas 10%-a da loĝantoj, kiuj povas esti cigan-devenaj. Do, sufiĉe malalta kvanto, se ni rigardas la tutlandan loĝantaron. Tamen jam longatempe oni nenion alian aŭdas en la televido kaj radio, kaj legas en ĵurnaloj, ke tiu etno **grave** determinas eĉ influas la hungarlandan loĝantaron... Ĉu vere?

Do, pri la cigana lingvo:

Tiu lingvo havas multajn dialektojn, kiujn oni uzas nur en parolo kaj estas tri, kiuj havas **skriban** formon en Hungario. Ĉe miaj manoj estas tri vortaroj, kiuj enhavas ne vastan vortkolekton. Pri kiuj mi temas?

Jen:

1, Romano Rácz Sándor - Kárpáti cigány - Magyar, Magyar - Kárpáti cigány szótár és nyelvtan (Karpata Cigana - Hungara kaj inversa vortaroj kaj gramatiko), Balassi Kiadó, Budapest, 1994, 125x184 mm, 136 p. ISBN 963 7873 78 3

2, Rostás-Farkas György / Karsai Ervin - Cigány - Magyar,

Magyar - Cigány szótár (Cigana-Hungara kaj inversa vortaroj), Kossuth Könyvkiadó, 1991, 128x205 mm, 318 p. ISBN 963 09 3495-7

3, Varga Ilona - Beás - Magyar, Magyar - Beás szótár (Beaša - Hungara kaj inversa vortaroj), Konsept-H Kiadó, MKM engedély száma: 44881/96, 172x243 mm, ISBN 963 8332 557

Por komparo staru nun ĉi tie kelkaj vortoj el la tri ciganaj lingvoj:

Hungara	Esperanto	Beaša	karpat-cigana	Cigana
ágy	lito	pát	o than, o vodro	pato, vodro
aki	kiu	sinyé	ako	kon
arc	vizaĝo	ubráz	i chham	musura
bolha	pulo	purik	i pushum	pishom
cipő	ŝuo	cipiljis	o kamashli	papuka
doktor	doktoro	duktor	o doktori	doktori, sastyari
egér	muso	sudik	o egeri	shimijako, mucur
fáj	doloras	daré	dukhal	dukhal
gomb	butono	bomb	o gombo	kochak
hús	viando	kárnyé	o mas	mas
ide	ĉi tien	áis	addya	kathe
igen	jes	da	ōja	ova, haj
jegy	bileto	biljég	o jedyo	somno

Kaj mi ankoraŭ povus vicigi la vortojn, esprimojn...

Tie venas mia demando: Kiun ciganan oni eklernu, elektu, kiu povus esti la determina? Oni ne estas kapablaj kompreni unu la alian; kiel ili povus reprezenti la tutan hungarlandan ciganaron? Povas esti, ke ilia perantlingvo (Esperanto) estas la hungara. Ĉu el inter ili ĉiuj konas la hungaran?

Tie envenas alia demando: Oni **devigas** ĉe ni lerni la anglan, kiel pli frue la rusan... Sed kiun anglan? Se oni ŝaltas la komputilon ĝi montras en sia lingva programo ĉ. 14 **diversajn** anglajn! Ilin estas kapabla la maŝino ekkoni. Estas simila la situacio ĉe la germana, hispana, franca ktp. Kontrolu la komputilon...

Nu tio ne povas okazi ĉe **ESPERANTO!** malgraŭ tio, ke mondscale estas uzata de multaj etnoj (nacioj, popoloj), des pli se mankas kelkaj vortoj en la plej nova PIV...

Ĉu vere? Ni esperantistoj nur plendi estas kapablaj...

Pripensu tion, kaj ek al disvastigo de Esperanto!

LIBRO

LIBRO

“REV-ENE” – NE NUR VORTLUDO

Paulo S. Viana

Okaze de la 103-a Universala Kongreso de Esperanto en Lisbono, unu el la plej interesaj programeroj, almenaŭ por amantoj de literaturo, estis la “aŭtoraj duonhoroj”. Ili estis pli ol dek, kaj ĉiam okazis en la mezo de la tago. Dum tridek minutoj, Esperantaj verkistoj prezentis al eta ĉeestantaro, en la interetaĝo apud la libroservo (strategia loko!), siajn verkojn kaj ĝeneralajn ideojn pri literaturo. Kelkaj eĉ kantis, aliaj disdonis dolĉaĵojn. Ĉeestantoj havis la okazon senĝene, neformale fari demandojn kaj ricevi vivecan impreson pri la personeco de admirataj verkistoj.

Mi ĉeestis plurajn aŭtorajn duonhorojn. Unu el la plej impresaj estis tiu de la hispana paro Miguel Fernandez kaj Miguel Gutiérrez Adúriz - ambaŭ membroj de la tiel nomata Ibera Skolo.

Mi estis ravita de la entuziasmo kaj komunikemo de tiuj intelektuloj. Ilia varmkora maniero travivi literaturon kaj transdoni ĝin al sia publiko estis mirinda. Unu el la libroj tiam prezentitaj estis “Rev-ene”, poemaro de la unua el ili. Post la kunsido mi rapidis al la libroservo por aĉeti mian ekzempleron.

La nedikan volumon eldonis Eldona Fako Kooperativa de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) en 2018. Bela kovrilo, klara preso, kaj mi ne trovis misskribaĵojn. Leginte la tutan libron, oni ne povas eviti la demandon: kion fakte celas Poezio?

Tiu nedika volumo malfermiĝas per enkonduko de la grava poeto Suso Moinhos kaj tuj poste prezentiĝas “Prelude”, en kiu oni legas absolute fascinan poemon sub la titolo “Vilaĝo en kalko”. En ĝi la poeto versumas kvazaŭ li penikus akvarelon por bildigi la diversajn momentojn de bela tago. Ĝi finiĝas per ĉi tiuj perlaĵ versoj:

*Ĉio scintilas kaj disfalas poste
kaj sin kroĉas kaj ligas kaj almetas
al faktoj alitempaj,
al sonĝoj aliesaj kaj sensencaj.
Formiĝas tiel vivo-historio.*

Sekvas pluraj sekcioj en la libro: Soci-kritikaj kantoj (en kiuj la poeto verŝas siajn plej indignajn kriojn kontraŭ malhomeco en la mondo); pluraj poemoj diversintencaj kun inspiro en movimentoj de muziko; Amkantoj (en kiuj la animo de la poeto proponas sian tutan pasion); Omaĝaj muzikpecoj (al pluraj admirataj personoj, inkluzive de la amata nepo Victor); kaj Fina Kanto (omaĝe al Fabienne Berthelot).

Tuta paletro da viglaj sonoj de Poezio. Valoras la penon legi ilin laŭtvoĉe, eĉ se nur al si mem: ili sonas jen susure, jen eksplode, jen lamente, jen ekstaze, ĉiam per forta emocia ŝarĝo. Tia estas la ekzistomotivo de Poezio: ĵeti en la mondon emocion. Konstante “revenigi revojn” al la homoj. Ne temas nur pri vortludo!

César Olegário

Forpasis la 7-an de oktubro 2018, pro diabeto kaj koratako, la 67-jara esperantisto César Olegário. Li estis emerita funkciulo en la sekureca sektoro de ŝtata kompanio Petrobrás kaj lasis edzinon kaj kvar gefilojn. Kunfondinto de Karagŭatatuba Esperanto-Grupo, ekde 1996 li aktive partoprenis en la E-movado de tiu urbo kaj de apudaj regionoj. Niajn kondolencojn al la familianoj.



Profiti de UK por turismo

Herbert Welker

En la lastaj jaroj sendube la plej grandioza Universala Kongreso de Esperanto (UK) estis la 100-a en Lillo (Francujo). Partoprenis 2.698 esperantistoj.

Por brazilanoj evidente la plej grava estis tiu organizita en Brazilo mem, en la urbo Fortaleza en 2002 (1.484 partoprenantoj).

La ĉi-jara 103-a en Lisbono ankaŭ estis tre speciala por brazilanoj, ĉar ekzistas apartaj rilatoj inter Brazilo kaj Portugalujo: multaj brazilanoj estas posteuloj de portugaloj (ĉar Brazilo estis kolonio de Portugalujo) kaj oni parolas la saman lingvon en la du landoj. Verŝajne pro la du faktoj, sed miaopinie pleje pro la dua, multaj brazilanoj partoprenis en la ĉi-jara UK, tiel ke Brazilo estis la lando kun la dua plej granda nombro da partoprenantoj: 128 (post Francujo – 244 – kaj antaŭ Germanujo – 123).

Kvankam la ĉefa kialo pro la vojaĝo al Portugalujo estis evidente partopreno en la kongreso, kelkaj brazilanoj sendube decidis aliĝi pro

unu aŭ pli da jenaj kialoj: pro la fakto, ke en Portugalujo oni parolas la portugalan (kio faciligas la vivon ekster la UK); ĉar ili ankoraŭ ne konis Portugalujon kaj volis profiti de la kongreso por viziti la landon; kaj eble por ekkoni la landon de siaj gepaŭloj.

Estu kiel ajn, la partoprenantoj de UK-oj ĉiam profitas la okazon por turismo, kaj la organizantoj konsideras tion, ofertante antaŭ-, dum- kaj post-kongresajn ekskursojn.

Malgraŭ la fakto, ke Portugalujo estas malgranda lando (iomete malpli granda ol la brazila subŝtato Sankta Katarino), ĝi prezentas grandan nombron da vizitindaĵoj, kaj multaj el ili povis esti vizitataj dum la proponitaj ekskursoj (evidente la partoprenantoj devis elekti unu aŭ kelkaj el ili; ne eblis viziti ĉiujn). Krome, kelkaj esperantistoj vizitis iun lokon proprainiciate. Cetere, Lisbono mem estas bela, vizitindega urbego,

kaj tre proksima al ĝi troviĝas aliaj vizitindaĵoj.

Ekzemple je distanco de nur 15 kilometroj ekzistas la bela Nacia Palaco de Queluz (kiun mi priskribis en artikolo publikigita en Brazila Esperantisto en decembro 2016) kaj je distanco de 40 km situas la enorma, vere impona Nacia Palaco de Mafra, pri kiu aperis teksto mia la 22-an de novembro 2016 en “Esperanta Retradio”. Tiujn du palacojn mi kaj mia edzino vizitis, kiam ni revenis el la 101-a UK en Nitro. Ankaŭ en “Esperanta Retradio” legeblas kaj aŭskulteblas mia artikolo de la 11-a de septembro ĉi-jare pri Évora, kiun ni vizitis kune kun ĉirkaŭ 40 esperantistoj en dumkongresa ekskurso.

Nun mi parolos pri unu el la plej gravaj portugalaj turismaj urboj, kiun mi kaj mia edzino vizitis dufoje dum nia ĉi-jara restado en Lisbono. Temas pri Sintra, kiu situas nur 25 kilometrojn for de Lisbono.

Estas tre facile iri tien, ĉar oni povas preni trajnon en la centro de la portugala ĉefurbo – en la stacio “Rossio” – kaj atingi la urbeton Sintra post 40 minutoj. Estas trajnoj ĉiuhore, sed matene oni prenu la trajnon

almenaŭ 15 minutojn antaŭ la foriro, ĉar ĝi tute pleniĝas je turistoj.

Apud la stacio de Sintra oni povas evidente preni taksion por iri al la malgranda centro de la urbeto (aŭ vilaĝo) kaj al la vizitindaĵoj, sed ankaŭ ekzistas pluraj aŭtobusoj (konataj per la angla esprimo “Hop-on Hop-off”), kiuj preterpasas la plej gravajn lokojn. Kaj multaj turistoj supreniras piede unu-kilometro-longan kaj sinuan ŝoseon ĝis la centro.

Kial Sintra prezentas tiom da vizitindaĵoj? Interalie ĉar ĝi situas en belega pejzaĝo en regiono de malgranda montaro, kie dum la someroj la temperaturo estas pli malalta, do pli agrabla, ol en Lisbono, tiel ke la Nacia Palaco de Sintra estis inter la 14-a kaj 20-a jarcento la somera reĝa rezidejo. Ĝi situas en la centro de la vilaĝo kaj estis konstruita laŭ diversaj arkitekturaj stiloj.

Je la distanco – piede - de 3 kilometroj (aŭ de 6 kilometroj per aŭtomobilo) troviĝas sur monteto la ruinoj de la Kastelo de

1
a Maŭroj,
konstruita en la 8-a
kaj 9-a jarcentoj de la maŭroj
kaj de kiu ekzistas ankoraŭ muregoj
kaj turoj, videblaj de tre malproksime.
Proksime al ĝi reĝo Ferdinando la 2-a
konstruigis ekde 1838 sur pli ol 500
metrojn alta monteto la Nacian
Palacon de la Pena (portugale: Palácio
Nacional da Pena). Ĝi estas impona
pro sia situo sur kruta roko kaj pro sia
romantika arkitekturo, en kiu miksiĝas
pluraj stiloj: ĉefe novgotika,
novmanuela, nov-islama kaj
novrenesanca. Por alveni al ĝi oni
devas unue iri per aŭtomobilo aŭ
aŭtobuso (kiuj supreniras sinuan
ŝoseon) kaj poste supreniri piede la
krutan rokon. Alveninte ĉe la pinto,
oni vizitas ne nur interesege palacon,
sed ankaŭ povas ĝui panoramon de la
tuta regiono.

Ses kilometrojn for de la centro de
Sintra troviĝas la Palaco de
Monserrate, konstruita meze de la 19-a
jarcento en miksita stilo, en kiu
superregas elementoj de la arkitekturo
gotika, araba kaj hinda.

Plia palaco – konstruita en la unua
jardeko de la 20-a jarcento kaj nomita
“da Regaleira” – situas en la Quinta da

Regaleira, kiu estas vasta kaj tre
interesa parko, en kiu troviĝas pluraj
konstruaĵoj, ĉiuj projektitaj de la
proprietulo (adepto de gnostika
kristanismo kaj de Rozkrucismo)
António Augusto Carvalho Monteiro
en stiloj novgotika kaj novmanuela.
Krom la palaco, la plej vizitata
konstruaĵo estas la larĝa kaj profunda
Iniciga Puto (Poço Inicático), ĉe kies
flankoj oni povas malsupreniri aŭ
supreniri tra spiralaj galerioj.

Malpli vizitata, sed ankaŭ tre interesa
estas la malgranda, simplega Konvento
de la Kapuĉuloj, konstruita en 1560
meze de la naturo kaj en kiu vivis
franciskanaĵ monaĥoj ĝis 1834.

Je la komenco de la 20-a jarcento
aristokratoj kaj milionuloj komencis
rezidi en Sintra dum la someroj, sed
jam antaŭe famaj artistoj kaj poetoj
vizitis ĝin (ekzemple la romantikaj
anglaj poetoj Coleridge, Wordsworth
kaj Byron) aŭ eĉ rezidis kelkan tempon
en tiu urbeto.

Ekde 1995 la tuta “kultura pejzaĝo” de
Sintra (al kiu apartenas la supre
menciitaj konstruaĵoj) estas monda
kulturheredaĵo de UNESKO.

BLINDA FIDO, TRANĈILO AKRA: tikla brazila momento

Paulo P Nascentes^[1]

“Eu queria não cantar a cantiga bonita/ que se acredita que o mal espanta. / Eu quero fazer silêncio, um silêncio tão doente do vizinho reclamar/ e chamar polícia e médico e o síndico do meu prédio/ pedindo pra eu não cantar. Agora falando sério. (Chico Buarque de Holanda)

La 7an de Septembro 2017 el Brazilo al la tuta mondo venis lumo: mirinda, mojosa, utila kaj promesplena Esperanto-retejo, nome *Brazila Kolekto* (www.) enhavanta aron da brazilaj kantoj esperantigitaj, reviziitaj, kanteblaj, kun elŝuteblaj muziktestoj kaj akordoj, do unujara *mirinfano* de la disvastigo de la Lingvo Internacia kaj de Esperanto-kulturo produktata nialande! Tiel, se vi ludas gitaron, tuj kantu kaj ĝuu la kolekton delonge kaj zorgeme preparitan. Distra unuafoja vizitanto ĵuros temi pri laboro de giganta teamo (iasence jes), tamen la sola respondeculo pri tiu valoraĵo estas la muzikestro, komponisto, gitaristo kaj muzikproduktisto Flávio Fonseca. Sur la menciita paĝaro paradas la plejbono de nia tutmonde konata brazila popolmuziko. “*Preskaŭ 300 kantoj, de preskaŭ 200 aŭtoroj, tradukitaj de*

ĉirkaŭ 50 esperantistoj tra la mondo” – asertas *Brazila Kolekto*. Aliru la paĝaron kaj konfirmu tiujn impresajn nombrojn.

Malgraŭ tio ke pri ĝi respondecas unuopulo, kolektiĝas nun duoncento da kunlaborantoj, inter kiuj modeste mi enviciĝas kun ĝis nun du versioj. La tendenco estas la kresko de tiu kvanto de tradukemuloj, ĉar iom post iom pli konata fariĝas tiu iniciato, pli subtenata de malavaraj monapogantoj ĝi fariĝas, pli agonoskata de profesiuloj ankaŭ ĝi fariĝas, konsiderante tion, ke, laŭ planoj de la retejestro, ĉiu kunlaboranto estos pagata pro sia partopreno, apenaŭ *Brazila Kolekto* havu sufiĉajn kondiĉojn tion plenumi. Tiam tradukistoj, muzikistoj, videoproduktistoj kaj ceteraj profesiuloj estos pagataj laŭ la

praktikataj merkatvaloroj. La ideo estas la produktado de profesinivelaj videoj pretaj furori pro la altkvalito de tiu kultura produktado. Jen aŭtentika kontribuo de Brazilo al la universala nemateria kultura heredaĵo, se tio kortuŝos nin.

Instiga defio estis por mi la esperantigo de *Studenta koro* (Wagner Tiso k Milton Nascimento) kaj *Blinda fido, tranĉilo akra* (Milton Nascimento k Ronaldo Bastos). Pri la elekto de tiuj kantoj, krom la estetika beleco de la poemoj kaj muzikoj, certe ĝi spegulas delonge studatan esplortemon, post iama publikigita akademia artikolo. Temas pri la rilato inter kreaĵoj de brazilaj komponistoj kaj la civitana rezistemo al troigoj de la tiel nomataj *plumbaj jaroj* dum la historiperiodo de 1964 ĝis 1985 en Brazilo. Ne nur Milton ekzempligastion, sed ankaŭ Edu Lobo, Chico, Carlos Lira, Francis Hime, Caetano Veloso, Gilberto Gil, João Bosco, Aldir Blanc, Vandr  ⁽¹⁾ kaj aliaj pere de ia “protesta kanto”. *Preparo de via kor’/ por kion rakontos mi/ mi venas de l’ interland’/ mi venas de l’ interland’/ mi venas de l’ interland’/ kaj povos ne plaĉi vin*. Tiu kanto de Vandr   k Th  o de Barros, ekzemple, atendas esperantigon. Ĉu vi, kara leganto? Minimume dirite, la defio estas plezure lerniga. *Brazila kolekto*

estas tamen multe pli ampleksa ol tio laŭ enhavo, temoj, tipaj stiloj. Samtempanoj de la menciita militista reĝimo kaj interesitaj posteuloj certe ĝis nun sentas la forton de kantoj tiaj, kies aŭtoroj multfoje bezonis haste kaj lasthore trovi novajn parolturnojn por ŝanĝi eltranĉitajn vortojn kaj frazojn far cezuristoj laŭ ordonoj de militistestroj de koncerna ŝtata departemento.

Muzikteksto detranĉita estis interaliaj tiu de “Partido alto”, sukceso de la muzikgrupo MPB 4. La originalo tekstis: *Dio estas mokemulo, ŝategas moke ludi/ por venigi min al mondo, l’ tutan mondon havis,/sed trovis Li pli gaje min ĵeti malfida,/ en la sin’ de la mizero/ mi venis drumisto*. Memkompreneble, *en la sin’ de la mizero* oni tiam nur rajtis naskiĝi “drumisto”, neniel “brazilano”, kiu estus, *ipso facto*, senigita de l’ civitaneco. Tiun denuncon la reĝimo ne permesus. Intervjuita de la gazeto *Caros Amigos* (Karaj Amikoj, dec. 1998), Chico Buarque tiel deklaris: “Neniam mi havis kontakton kun kantocenzuristo. Okaze de kelkaj kantoj, kiam ili iris al Braziljo, advokato de la surbendigo-entrepreno pritraktis tion. Foje, ekzemple, okazis parta malpermeso, per kiu iu teksto liberiĝos nur se ŝanĝita iu verso. Li

telefonis el Braziljo kaj mi, du aŭ dek minutojn poste (mi povus esti pensinta plie), diris: “Enmetu la vorton “*drumisto*” (rido)”. Kiu tiam ne kantis la faman *Ebriulo kaj ŝnurdancistino*, de Bosco k Blanc, kun metafora, sed eksplicita aludo al la torturo de oponantoj? Ludu kaj kantu la version de Wel.⁽²⁾

Simile okazas ĉe la versoj *Jesuo Kristo iam min pagos, iam min eksplikos,*/ kiel *metis en la mondon ĉi povran aĵeton (malmultan feketon)*. La originalajn vortojn kantas Cássia Eller.

Samkuntekste, furoris *Studenta koro*,⁽³⁾ konata kiel la “himno de la rektaj” (aludo al la movado favore al la reveno de rektaj voĉdonoj nialande). Kuriozaĵoj pri tiu traduko estas la intenca “forlaso” de la distingo pri ĝenro, ĉikaze negrava. Anstataŭ *rideto de knabo* (“*um sorriso de menino*”) la elekto estis *Ĉi rideto de knabino* (“*de menina*”), pro rimo kaj ritmo. Krom tio la lasta verso *Por ke vivo ĉe ni floru, ĝi fruktu* plibone spegulas interesan lingvan trajton de Esperanto, nome ke ĝi estas verbocentra. Tiel por la portugala esprimo “*a vida nos dê flores e frutos*”, kun substantivoj, uzindas imperativaj verboformoj: “*vivo ĉe ni floru, ĝi fruktu*”.

Pensiga estas *Blinda fido, tranĉilo akra*, titolparto de ĉi artikolo. Kial tiu stranga malintereso pri (elir)vojo por nia popolo kaj nova aŭroro (*De nun nek frumateno estas atendata*)? Ĉu eble ĉar *la blinda brilo de pasi’ kaj fid’... estus ia tranĉilo akra*? Kiel danĝera kaj detrua povas esti *brilo de pasi’ kaj fid’*, kiam ambaŭ montriĝas *blindaj*? Kien povos nin konduki tiu blindeco tiam disa meze al parto de nia popolo, konsidere ke nia socio tiam estis politike dividita (ĉu ankoraŭ nun)? Jen ne ĉiuj aprobis la vizion de tiuj aŭtoroj. Malgraŭ tio, la tri lastaj strofoj montras alitipajn simbolojn, ekzemple, la rajton al persona trankvila lumbrilo, trankvila amrajta kresko, la tritikoplantadon kaj refaron de l’ pano ĉiutaga, la renaskiĝon tra la vino, la grundan salon, simbolojn trovitajn ene de spiritalia kunteksto. Ĉu tiu ampleksa penso superas ideologiojn kaj sektarismojn? Jen pensindaĵo pri tio, kio nin kunigas kaj nin apartigas. Verdire ĉu tio utilas por la tikla monda kaj aparte brazila momento nun travidata? Ĉu nuna aŭ ĉu *onta ŝoseo*? Elektu vi mem.

Konklude, tamen sen ajna komentario, jen sube malkompleta listo de ebla vojo al (volonta ankoraŭ) kunlaboro. Ĝis *Brazila kolekto* atingos financan memstarecon, ege bezonatas artistoj,


muzikistoj, muzikgrupoj, kantistoj, poetoj, verkistoj, tradukistoj, jutubistoj, muzikestroj, esploristoj, ĵurnalistoj, publicistoj, videoproduktistoj, dramverkistoj. Kara leganto, se vi supozos, ke supre estas duonvualita invito al via talento, certe vi pravas. Muzikoterapio, edukado, lingvoinstruado, kiom da ebloj, ĉu? Kial *blinda fido*, *tranĉilo akra*? Kiel kompreni tiujn simbolojn kaj nunajn sinsekvojn? Artikolu prie!

(*) Poeto, magistro pri Beletro, lingvinstruisto pri la portugala kaj Esperanto.

(1) <https://www.brazilakolekto.com/search/label/Geraldo%20Vandr%C3%A9>

(2) <https://www.brazilakolekto.com/search/label/Jo%C3%A3o%20Bosco>

(3) <https://www.brazilakolekto.com/search/label/Paulo%20Nascentes>



LINGVAJ RESPONDOJ DE FRANCISCO WECHSLER

Demando:

Kiu estas la preciza diferenco inter: *deiri* kaj *eliri*; *deveni* kaj *elveni*; *defali* kaj *elfali*; *deigi* kaj *eligi*?

Respondo:

La difinoj donitaj en *NPIV* estas sufiĉe klaraj por distingi la unuan vorton de ĉiu paro disde la dua. Mi konsilas, ke oni atente legu kaj komparu tiujn difinojn kaj la koncernajn ekzemplojn. Por la jena klarigo, mi prezentos pliajn ekzemplojn; la signifojn de la fontsimboloj konsultu ĉe la fino.

Deiri / eliri

Deiri signifas esence iri, malproksimiĝante de loko: *Post la tagmanĝo la societo deiris en la ĝardenon* (FK); *Se vi estas la Filo de Dio, deiru de la kruco* (NT); *De la pura, larĝa ŝtuparo, kiu kondukis al la pli alta etaĝo de la konstruaĵo, konstante deiradis homoj [...]* (Ma); [...] *dum sinjoro Craggs deiris en sian estimatan tombon [...]* (BV); *Kiam Abigail ekvidis Davidon, ŝi rapide deiris de la azeno [...]* (MT)

Figursence *deiri* signifas uzi fakton aŭ argumenton kiel bazon por derivi rezonlinion: *Aliflanke ni havas tekston B, kiu deiras de romkatolika eklezi-jura tezararo [...]* (Mo); *la deirpunkto de via rezonado estas malvera premiso*.

Kompare, *eliri* signifas moviĝi eksteren el io: *En tombo mi estas tenata, Mi nur en la nokto eliras Al vi, mia sole amata!* (UL); *Tajloroj kaj botistoj, — ĉiuj homoj eliris sur la straton [...]* (DL); [...] *tiu ĉi granda infano, kiun vi tie ĉi vidas, ne eliris ankoraŭ el la infanaj vindoj* (H); *ĉe ĉiu vorto, kiun vi parolos, eliros el via buŝo aŭ serpento aŭ rano [...]* (FE).

Oni ankaŭ uzas *eliri* figursence kun pluraj signifoj:

a) Pasi de malbona situacio al pli bona: *La rozoj eliris el la katastrofo feliĉe, ili staras ankoraŭ kun ruĝaj vangoj*. (Ma); *virtulo eliras el mizeroX; Eliri sen frakaso el granda embaraso* (PE); *Mi elirigos vin el sub la jugo de Egiptujo [...]* (MT).

b) Aperi publike: *Sed de l' tago, kiam **eliris** mia libreto, mi komencis ricevi multon da leteroj [...]* (UL); ***Elirante** ankoraŭ unu fojon antaŭ la estimata publiko [...]* (DL); [...] *nia unua debuto, la unua lernolibro de nia lingvo, **eliris** en lingvo rusa [...]* (LR).

c) Origini el, deveni de: *Kaj la nombro de ĉiuj animoj, kiuj **eliris** el la lumbo de Jakob, estis sepdek [...]* (MT); *Kaj Gideon havis sepdek filojn, kiuj **eliris** el liaj lumboj [...]* (MT); *Ne el la polvo **eliras** malpiaĵo [...]* (MT); *Pli ol ĉion gardatan, gardu vian koron; Ĉar el ĝi **eliras** la vivo.* (MT).

d) (io) Esti en direkto al, doni vidon al: *la fenestro **eliris** sur korton (Z); la ĉambro **eliris** sur kampon (Z).*

Deveni / elveni

Deveni havas du signifojn:

a) Veni de ia origino, fonto; rezulti, fondi de: *Ekzemple, se la adverbo **devenas** de verbo transira (kiu postulas akuzativon) [...]* (LR); [...] *de tio **devenas** la kutimiro: “returne enpoŝigi la fluton” (FA3); [...] nenion el tio, kio **devenas** el vinberbranĉo, ŝi manĝu [...]* (MT); *Ni scias, pli malpli, de kio **devenas** la korpaj malsanoj [...]* (PF).

b) Esti ido de: [...] *kaj de ŝi **devenos** popoloj, reĝoj de popoloj **devenos** de ŝi* (MT); *En la Biblio estas ja dirite: ĉiuj nobeloj **devenis** de Adamo (H); [...] ili **devenas** el familio, kiu enmigris el fremdaj landoj [...]* (FA2).

Kompare, *elveni* signifas:

a) Veni el io: *Tuj poste la granda Niko **elvenis** el la preĝejo [...]* (FA1); [...] *kiel la rampaĵoj sur la tero, kun tremado ili **elvenos** el siaj kaŝejoj [...]* (MT).

b) Rezulti (ĉi-sence *deveni* kaj *elveni* tre similas): *El tio povas **elveni**, la diablo scias, kio (R).*

Defali / elfali

Defali havas tri signifojn:

a) Fali de supraĵo: [...] *tiam ŝajnis al ŝi, kvazaŭ ĉiuj steloj de la ĉielo **defalas** al ŝi (FA1); La hararo **defalis** de lia kapo [...]* (DL); *La oficiala tego, per kiu sin kovradis la mastrino [...], ne **defalis** de ŝi tute, sed ĝi fariĝis travidiga [...]* (Ma).

b) De pli bona al pli malbona fali: *Ili **defalis** kaj perfidiĝis, kiel iliaj patroj [...]* (MT);

c) Forlasi partion, religion; ribeli kontraŭ: [...] *ili devis tute **defali** de ĉia*

religio [...] (PH); *Tiamaniere Izrael **defalis** de la domo de David ĝis la nuna tago* (MT); *Sed ili **defalis** de Dio de iliaj patroj, kaj malĉaste sekvis la diojn de la enlandaj popoloj [...]* (MT)

Elfali signifas fali el interno eksteren: [...] *la patro **elfalis** el fenestro de tria etaĝo kaj mortigis* [...] (DL); [...] *dum ŝi parolis, **elfalis** el ŝia buŝo multego da diamantoj* [...] (FE); *Mi vidas, ke mono **elfalis** el via mano* (R).


Deigi / eligi

Deigi signifas apartigi, meti malproksimen de: *Kvazaŭ per surda muro ĝi deigis senhomecon, mallumon kaj silenton for de la brilanta kaj brua centro* (Me).

Eligi signifas fari, ke io estiĝu el io; movi el io: *Ŝi tamen **eligis** nenian sonon* [...] (Ma); *La alumeto **eligis** varman helan flamon* [...] (FA2); *Kaj Dio la Eternulo **eligis** lin el la Edena ĝardeno* [...] (MT)

Fontsimboloj:

BV = *La Batalo de l' Vivo*; DL = *Dua Libro*; EE = *Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia*; FA = *Fabeloj de Andersen*; FE = *Fundamenta Ekzercaro*; FK = *Fundamenta Krestomatio*; H = *Hamleto*; Ma = *Marta*; Me = *Metropoliteno*; Mo = *revuo Monato*; MT = *Malnova Testamento*; NT = *Nova Testamento*; NPIV = *Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*; PE = *Proverbaro Esperanta*; PF = *Patroj kaj Filoj*; PH = *Pri homaranismo*; PIV = *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*; PV = *Plena Vortaro de Esperanto*; R = *La Revizoro*; ReVo = *Reta Vortaro*; UL = *Unua Libro*; Z = *Zamenhof*



Titolo: La senditoj
 Aŭtoroj: Andreo Ludoviko/Chico Xavier
 Eldonejo: FEB/Lorenz, 2017
 Formato: 14 x 21 cm 267 paĝoj
 Prezo: R\$ 35,00

Per tiu verko la aŭtoro montras ke la morto de la korpo senŝualigas la spiritan vivon kiel daŭran evoluadon.



TIBOR, MIA HUNGARA SAMIDEANO

Maria Nazaré Laroça, v. Szabadi Tibor J.

Esperanto ebligas veran interkulturan komunikadon. Laŭ William Auld: “La lingvo Esperanto estas fenomeno unika: ĝi estas la sola arta lingvo en la historio de la mondo, kiu ekvivis kaj daŭre pli fariĝis komuna lingvo de homoj el ĉiuj nacioj kaj ĉiuj mondpartoj, krea lingvo de poetoj kaj faka lingvo de sciencistoj, plenrajta komunikilo apud ĉiuj aliaj, laŭdire ‘naturaj’, lingvoj.”

Ĉiutage oni konstatas la viglan kulturan interŝangon en Esperantio. Permesu, ke mi rakontu interesan kaj agrablan fakton. Ĉijare, la 21-an de septembro, v. Szabadi Tibor J., eminenta hungara samideano, afable mesaĝis al mi petante permeson por traduki al la hungara mian dulingvan poemlibron **Birda grundo** [*Chão de pássaros*]. Kaj post kelkaj retmesaĝoj li jam ankaŭ intencas traduki hungaren mian Esperantan poemaron **Penseroj**.

Estas granda honoro lia intenco! Szabadi Tibor J. estas klera esperantisto, kiu senlace laboras favore al nia lingvo, kiel kompetenta lingvisto, vortaristo, filozofo, tradukisto...

Tibor estas dumviva membro de AIS (Akademio de Internacia Sciencoj de San Marino) kaj dumviva membro de Hungarlanda Esperanto Asocio, li estas eĉ ano de Hungara Verkista Asocio. Mi profitas la okazon por citi kelkajn partojn el niaj korespondaĵoj:

“Mi daŭre (kontinue) tradukas verkojn el Esperanto al la hungara, interalie ĝis nun mi tradukis la ĉefverkojn de Allan Kardec kaj ankaŭ aliajn verkojn, el kiuj multajn jam eldonis libroforme, hungare miaj brazilaj amikoj. (...) Mi klopodis traduki tiujn verkojn, kiuj ankoraŭ NE aperis en la hungara lingvo el multaj diversaj kulturoj, kaj de multaj popoloj. (...) La verkojn de A. Kardec mi tradukis – kiuj estis Esp-e eldonite – laŭ la nuna lingvouzo

de la hungara, sed ĝis nun NE ĉiuj estis eldonitaj libroforme. Eble pli poste. Tion mi scias, kiuj legis hungare – en mia traduko – la spiritismajn verkojn, malgraŭ, ke ili ne estas spiritistoj, volonte legis ilin. Eĉ okazis plurfoje – pri kio mi scias –, ke estis homoj, kiuj ne plenumis la "planitan" sinmortigon, ĉar ili legis la libron: "Memoraĵoj de sinmortiginto". (...) Mian skribon vi povos trovi en **Almanako Lorenz 2018** inter 123-129 paĝoj”.

Mi finas ĉi tiun artikoleon kun malgranda sinprezento de Tibor, kiu volonte kaj afable konsentis kunverki por **La Lampiro**. Mi ŝatus demandi al li, kial li decidis traduki miajn poemojn, kaj kia estas tia laboraĵo.

Jen de li:


v. Szabadi Tibor J.

Kara mia – nun mi jam povas diri, skribi – amikino Nazaré!

En la pasinteco, ĝis nun, mi tradukis el Esperanto poemojn, beletraĵojn, filozofiajn, lingvistikajn verkojn al la hungara kaj renverse al Esperanto. Ĉiam nur tion mi tradukis, kiuj kaptis mian atenton, intereson kaj iom efikis sur min. Tiel okazis, kiam mi plej unue manricevis la pere de helikpoŝto, en paperformo aperintan poem-libreton de Maria Nazaré Laroca, de eldonejo Lorenz. Tuj kaptis min la stilo de la verko. Kaj mi decidis peti kontakton kaj PERMESON de la verkistino, poetino Nazaré, por ke mi traduku ankaŭ ŝian libron al la hungara. Ŝi jese respondis. Mi komencis traduki. Mi povis konstati, ke mi bone decidis, ke mi DEVAS ŝiajn poemojn traduki al la hungara, ke ankaŭ la hungarlingvanoj ekkonu ŝiajn pensojn, kiujn ŝi peras al la legantoj. Mi esperas, se aperos ŝiaj poemoj ankaŭ en la hungara, kiuj ĝis nun estas en la portugala kaj en Esperanto, mialingvanoj simile ĝoje legos ilin. Mi ĉion provos fari, ke ŝi estu legebla en la bela hungara lingvo.

Kiu konas mian biografion, povas vidi, ke mi divers-skale tradukas. Mia ĉefideo: mi intencas servi la ekkonon de diversaj kulturoj, kaj al tio estas nepre la plej taŭga lingvo: ESPERANTO. Dank’ al ĝia “kreinto”...


Do, eble poste, iam, oni povos legi la poemojn de Nazaré ankaŭ en la hungara. Estu tiel! La afero ne dependos de mi... Mi petas al mia laboro la helpon de Bonaj Spiritoj!



Titolo: Nigra birdo kaj aliaj rakontoj
 Aŭtoro: Paulo Sérgio Viana
 Eldoninto: EASP, 2018
 Formato: 14 x 21 cm, 124 paĝoj
 Prezo: R\$ 20,00
 Kolekto da 24 rakontoj



Titolo: Al ĉiu tago ĝia legaĵo
 Aŭtoro: Paulo Sérgio Viana
 Eldoninto: EASP, 2018
 Formato: 14 x 21 cm, 168 paĝoj
 Prezo: R\$ 25,00
 kolekto da 54 artikoloj pri diversaj aktualaj temoj de la ĉiutago publikigitaj kaj voĉlegitaj en la paĝaro Esperanta Retradio.




Titolo: O Esperanto além da língua
 Organizantoj: Fernando Pita kaj Guilher Fians
 Eldonejo: Temática, 2017
 Prezo: R\$ 40,00
 Kolekto da eseoj de pluraj aŭtoroj pri diversaj aspektoj de Esperanto kiel lingvo kaj movado.

A livraria da EASP está acessível também pela internet

Faça-nos uma visita!

Didáticos
Paradidáticos
Dicionários
Literatura
Quadrinhos
Não-ficção
Suvenires



easp.org.br/butiko